



# Argenta Filiko

ISSN 1176-418X  
6-monata Bulteno  
de Nov-Zelanda  
Esperanto-Asocio

Revuo por membroj de la Nov-Zelanda Esperanto-Asocio

Septembro de 2013

Nov-Zelanda Esperanto-Asocio, PO Box 8140, Auckland 1150

Telefono: 0800 350 781

Retadreso: [info@esperanto.org.nz](mailto:info@esperanto.org.nz)

## Venonta somera kongreso

Nia kongreso por 2014 okazos denove en Auckland en januaro ĉe la St Francis Retreat Centre en Hillsborough. Ni decidis refoje kongresi tie venontjare ĉar la etoso de tiu kongresejo estas tiel bona ke ĉiuj ĝuas esti tie dum longaj someraj tagoj. Ĉi-foje venos Esperantisto el Nepalo por gvidi, distri, kaj instrui Esperanton. Bharat Ghimere estas sperta instruisto kiu, antaŭ nia kongreso, ankaŭ instruos en la somera kursaro en Kanbero (vidu <http://aea.esperanto.org.au/congress/> se vi volas partopreni tiun eventon).

Aliĝu al la kongreso nun  
– plenumu kaj sendu la  
ĉi-kunan aliĝilon

Sign up to the congress  
now – complete and  
send in the attached  
registration form

Nia venonta kongreso estos kiel en ĉiuj jaroj: klasoj, prelegoj, jarkunsido de NZEA, ekskursoj, teatraĵetoj ktp. Eblas resti surloke ĉe la kongresejo, kaj ni rekomendas tion ĉar la manĝaĵoj estas ege bongustaj. Vi certe dikiĝos post semajno tie!

## Vintra renkontiĝo

NZEA okazigis *Vintran Esperanto-Renkontiĝon* dum la 20a kaj 21a de julio 2013. Membroj kiuj ĉeestis antaŭfojajn NZEA-jarkongresojn verŝajne memoras la ejon *Alpers Lodge* en Newmarket. Ĉi-foje, ni dungis ĉambron en la restoracio por nia babilada rondo.

Dum la unua tago kaj la komenco de la dua, tiu babilado temis pri strategia planado por NZEA. Plejparte, estraranoj kaj aliaj diskutis la estontecon de la movado en Nov-Zelando kaj strategiojn paralele kun la Universala Esperanto-Asocio. Ni ĉiuj scias ke la plej granda defio de nia movado estas la fakto ke ĉiuj (certe en Nov-Zelando) estas volontuloj, kaj strategia plano funkcias nur kiam ni trovas efikan agadmanieron en kadro de ĉio kio estas realigebla.

La Estraro komencis dividi respondecojn kaj rolojn, laŭ kapabloj, spertoj, kaj preferoj. Sed tio ne estis la sola intenco de nia renkontiĝo. Ni esperas ke la *Vintra Esperanto-Renkontiĝo* daŭre okazos por ke Esperantistoj (aparte nov-zelandaj) ne nur renkontiĝu grandskale unufoje jare dum nia jara kongreso sed ankaŭ por doni alian eblecon por uzi kaj ĝui Esperanton, aŭ kiel oni diras: por *esperantumi*.

## Jarkunsido/Annual General Meeting

La venonta jarkunsido de NZEA okazos ĉe St Francis Retreat Centre, 50 Hillsborough Road, Mt Roskill, Aŭklando, je la 10.30 atm, la 19-an de januaro 2013.

The next annual general meeting of NZEA will take place at St Francis Retreat Centre, 50 Hillsborough Road, Mt Roskill, Auckland, at 10.30am on Sunday, 19 January 2013.

Membrokotizoj por 2013/14 nun pagendas. Bv. plenumi kaj sendi la ĉi-kunan membroaliĝilon.

Membership fees for 2013/14 are now due. Please complete and send in the attached membership renewal form.

## Adresaro de NZEA - ĉu bona ideo?

Kelkaj membroj de NZEA jam komentis ke ili volas korespondi kun aliaj membroj, specife kun aliaj kiuj havas similajn ŝatokupojn. Pro tio, ni konsideras prepari adresaron (adresliston) de membroj, se membroj opinias ke tio estas bona ideo. En la ĉi-kuna membrokotizilo ni lasis spacon kie vi povos skribi viajn interesojn/ŝatokupojn. Se ni ricevos sufiĉe multajn respondojn, ni provos publikigi adresaron kiu montros vian nomon, kontaktdetalojn, kaj interesojn/ŝatokupojn. Vi ne devas fari tion – nur se vi volas. Por dumvivaj membroj (kiuj ne ricevas membroaliĝilon) kaj aliaj kiuj pagas kotizon per Interreta transpago, bonvole sendu mesaĝon al ni por indiki ĉu vi volas ke viaj detaloj aperu en adresaro kun viaj intereso.

## Libroj

Se vi volas ion por legi, aŭ se vi volas lernolibron por pruntedoni al iu kiu volas lerni Esperanton, ne forgesu ke NZEA havas multajn librojn kiujn ni pretas donaci.

En la apuda foto: nova 'biblioteko' en post-tertrema Christchurch. Iu havis ege bonan ideon lasi jam legitajn librojn en tiu ŝranko ĉe urbcentra stratangulo. Se vi havas librojn por donaci – lasu ilin tie. Se vi volas legi libron, elektu unu, senpage.



## Kluboj tra la lando

Jen kontaktdetaloj de niaj kluboj tra la lando

**Christchurch:** Grupo kunvenas en Christchurch. Kontaktu Erin McGifford ĉe [erinmcgifford@iconz.co.nz](mailto:erinmcgifford@iconz.co.nz).

**Wellington:** La Rondo de Wellington kunvenas inter februaro kaj decembro, la duan merkredon de ĉiu monato en la domo de Mary Richardson en Upper Hutt. Kontaktu David ĉe [ryangomez@xtra.co.nz](mailto:ryangomez@xtra.co.nz) aŭ 04 479 4911.

**Bay of Plenty:** Grupo kunvenas regule en ĉi tiu regiono. Kontaktu Vicky Crickett ([vcrickett@gmail.com](mailto:vcrickett@gmail.com)).

**Auckland:** La Esperanto-Societo de Auckland regule kunvenas en Glendene. Por pliaj detaloj, bonvolu kontakti Howard ĉe 09 626 6129 aŭ Bradley McDonald ĉe 09 579 4767, aŭ retpoŝte ĉe [hgravatt@ihug.co.nz](mailto:hgravatt@ihug.co.nz) aŭ [bradley.m@vodafone.co.nz](mailto:bradley.m@vodafone.co.nz).

**Masterton:** La klubo kunvenas je la 2-a ptm ĉiun merkredon inter februaro kaj decembro en la domo de klubano. Kontaktu Marilyn Henderson (06 377 0499).



Foto: [Matthew25187@en.wikipedia](https://en.wikipedia.org/wiki/File:Matthew25187@en.wikipedia)

NZEA havas paĝon ĉe [www.meetup.com/Esperanto-NZ/events](http://www.meetup.com/Esperanto-NZ/events). Tie vi trovos detalojn pri niaj kunvenoj en Nov-Zelando, kaj ankaŭ pri kunvenoj de Esperantistoj en aliaj landoj. Aliĝo al la retpaĝo estas senpaga.